



# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. — Redaktas Dr Stan. Kamarýt.

*La 9-an de majo 1950 pasis kvin jaroj de la tago, kiam la glora Ruĝa armeo atingis nian ĉefurbon Praha kaj liberigis ĝin de germanaj naziistoj. Ni uzu tiun ĉi datrevenon por esprimi ankaŭ esperantlingve la profundan dankemon de la ĉeĥoslovaka popolo al sovetia armeo kaj al sovetiaj popoloj, gvidataj de generalissimo Stalin al venko en batalo por paco. La paco, la nedividebla paco, estas nia butakrio.*

## Adolf Malík: K dnešním dnům

Ĉasto se zamýšlím nad tím, odkud pramení potíže, které my esperantisté musíme v těchto dnech překonávat. Příčin je zajisté několik. Je to neláska k esperantu v řadách lingvistů, kteří v esperantu vidí pouze „slepeninu“ a nevidí jeho funkčnost. Je to požadavek doby, kdy celá řada lidí se učí jazykům velkých národů, a tuto skutečnost nutno vidět reálně, neboť je životní nutností téměř každého z nás. Ale to by nebyly ty hlavní překážky naší práce na poli kulturních styků s cizinou. Hlavní zábranou naší práce je neurovnánná mezinárodní situace, která vytvořila dva tábory, tábor míru, sdružující obyvatele lidových demokracií v čele se Sovětským svazem, který je vzorem také všem pokrokovým složkám v západních zemích, a tábor imperialismu, který přípravou třetí světové války brzdí mírovou výstavbu světa a štvavou propagandou ničí hospodářské i kulturní snahy po spolupráci mezi národy. Je přirozené, že za takovéto situace těmi hlavními potřebnými jsou esperantisté ve všech zemích. Ano, to je naše Achillova pata. Tu jsme zranitelní, a naše práce je takovouto situací značně stížena. Nuže, známe-li skutečnost, co uděláme? Strčíme hlavu do písku, jako to dělají pštrosové, nebo zvýšíme činnost? Odpověď je snadná: zvýšit činnost ve prospěch pokrokových sil světa, neboť ty nakonec slavně zvítězí. Zvítězí, protože na jejich straně je pravda a pravda vítězí. Tedy co budeme dělat? Flintu zahodí do žita vždy jen zbabělec a to my pokrovní lidé neuděláme. Budeme ještě úsilovněji bojovat proti kapitalistickému štvání do nové války. Z dnešního tisku se dovidáme, proč tábor imperialismu štve ná-

rody do nové války: štve proto, aby zabránil vzrůstající hospodářské krizi v kapitalistických zemích, aby zachránil své bezpracné zisky, aby zabránil vítězství pracujícího lidu, který se v kapitalistických státech pozvedá k odporu. Je jasné, že těmto temným silám imperialismu svět míru, svět pokroku, zabráni vyvolati nový konflikt, ale je jasné, že pomáhat vítězství míru musí každý pokrokový člověk na světě. Bez této spolupráce, bez proletářského internacionalismu, který sdružuje v táboře míru a pokroku všechny lidi dobré vůle, nebylo by vítězství pokrokových sil proti světovému imperialismu. Jedna z neúčinnějších zbraní proti válečnému štvání, proti panice strachu, je budování vlasti. Buduj svou vlast, posilíš mír a posilíš ho i svou denní drobnou práci na poli kulturních styků s cizinou. Právě v této době mohou esperantisté vykonati pro naši republiku mnoho dobrého, když budou cizinu informovati o budovatelském úsilí našeho lidu, o úspěšném plnění pětiletky, o našem bohatém životě kulturním, a to jak na venkově tak i v městech a také o rušitělných naší výstavby, jako byl ten kejkliř v kostelce číhoštském. Takovouto službou naší lidové demokratické republice jsme povinni a jsem přesvědčen, že každý z nás tuto povinnost rád plní. V době zvýšené bdělosti národa, zvýšte bdělost i v klubech esperantských a neštrpte mezi sebou ty, kteří by rušili a poškozovali naši práci pro republiku. Tím prospějete zvýšené bdělosti, i sami sobě, tím prospějete i naší esperantské práci. Škůdce chránit nebudeme. Věrně samideány budeme v jejich úspěšných práci podporovati.

## Ad. Malík: Ne ekzistas homo pli blinda ol tiu, kiu ne volas vidi


En Portugalujo Esperanto ne estas permesata; oni ne povas sendi esperantajojn al samideanoj de tiu ĉi lando. Ĉu Portugalujo estas lando kun komunista reĝimo, ĉu ĝi estas popol-demokratia? Ne estas. Portugalujo estas lando de la Usona sfero, kaj tamen oni ne povas plu kalkuli kun Portugalujo kiel kun lando favora al Esperanto. Sed ĉu aliaj landoj de Marshall-Plano estas favoraj al Esperanto? La spertoj diras, ke ne. Do kion ni vidas? Ni vidas, ke la okcidentaj registaroj, la kapitalistaj registaroj, ne favoras Esperanton. Ĉu Sovetunio favoras Esperanton? Spertoj diras, ke ankaŭ ne, kaj ni tuj demandu, kial? —

Estas ja konate, ke Sovetunio multe favoris Esperanton, ĝis kiam montriĝis reakcio en la rondoj de sovetaj esperantistoj, kiam oni konstatis, ke esperantistoj en Sovetunio — ne ĉiuj — helpis al spionada servo kontraŭ la ŝtato. Kie estas do la kulpo, ke en Sovetunio Esperantomovado velkis kaj mortis? La kulpo estas en la vicoj de la sovetaj esperantistoj, kiuj stariĝis kontraŭ la reĝimo. Do kion diras al ni tiu ĉi malĝojiga fakto? Ke miopuloj de nia esperantista familio malutilis Esperanton sur la teritorio de Sovetunio, pri kiu ili kredis, ke ĝi ne daŭros longe, ke la caro revenos. La ĉaro ne revenis, Sovetunio glori-

venkis kontraŭ ĉiuj malamikoj, la soveta popolo venkis ĉiujn Denikinojn, Kolĉakojn, Wrangelojn, la intervenantajn anglousonajn trupojn, unuvorte post la unua mondmilito la soveta popolo purigis la landon de ĉiuj fremdaj parazitaj kaj komencis masoni novan socialistan ŝtaton, la unuan en la mondo. Tion envie, sed samtempe senpotence, observis la kapitalistoj de la mondo, kaj ili konsciigis al si la grandan danĝeron, kia por ili povus veni el la socialista ŝtato. Kion ili rigardis plej urĝa? Ili decidiĝis detrui la socialistan ŝtaton kaj tuj komencis prepari la duan mondmiliton. Kapitalistoj armis germanajn nazistojn, permesis al Hitler okupi Aŭstrion, Ĉeĥoslovakion, kaj ili ne kontraŭstaris lin, kiam li atakis Polujon. Pro tiu ĉi dua mondmilito kapitalistoj multe ĝojis, ĉar ili sciis, ke iliaj sakoj pleniĝos per militprofitoj, sed ĉefe ili esperis, ke „La Tria Regno“ de Hitler kaj Sovetunio per la milito tiom elĉerpiĝos, ke la kapitalistoj mortigos du muŝojn per unu bato. Kio okazis, vi ĉiuj scias. Sovetunio glorie venkis. La planoj de la kapitalistoj fiaskis, kaj nun Sovetunio estas pli potenca ol iam ajn en la pasinteco. Kapitalistoj armis la ĉinan reaktivilaron kaj esperis krei en Ĉinujo novan atakbazon kontraŭ Sovetunio. Sed ankaŭ tie ili malvenkis kaj la ĉina popolo sub la gvido de Mao Ce-tung fariĝis libera popol-demokratia ŝtato. Per tiu ĉi venko de la ĉina popolo la fortoj de paco multobliĝis tiom, ke la kapitalistoj povas novan militon, kiun ili denove preparas, komenci, sed venki ili ne povos, ĉar ĉesis ne nur la ideoj, sed ankaŭ la materiaj kondiĉoj por tia venko, je kiu kapitalismo, la Usona imperiismo, esperas. Progresemaĵoj fortoj en kapitalistaj ŝtatoj subtenas la pacan politikon de Sovetunio kaj de la demokratiaj ŝtatoj, kaj ili jam nun aktive laboras kontraŭ la militinstigantoj. Estas klare, ke imperiistoj de Wall Street havas nenian ŝancon povi savi sin per nova milito. Kun Sovetunio iras ĉiuj pacaj fortoj de la mondo, la proleta internaciismo venkas jam nun kontraŭ la internacia imperiismo. Sovetunio, la unua socialista ŝtato en la mondo, fariĝas modelo al ĉiuj nacioj, kiel krei pli bonan, pli feliĉan vivon sur la terglobo, egale ĉu por blank- aŭ kolorhaŭtuloj. Jam nun vidiĝas sur horizonto la venko de la homaro laboranta kontraŭ ĉiuj parazitaj de l' homo vivo. La lumo de progreso trapenetas el Moskvo en ĉiun angulon de la mondo, jam kolektiĝas pacaj batalantoj, kiel diris Zamenhof. El tiu ĉi vidpunkto vi mem povas prijuĝi, kion kaŭzis la miopuloj, kiuj ne vidis klare la bonan vo-

lon de Sovetunio subteni Esperanton. Se la miopuloj agas alie, Esperanto fariĝas la plej subtenata faktoro sur la teritorio de Sovetunio, kaj nun ankaŭ en la granda nova Ĉinujo kaj en ĉiuj popol-demokratiaj landoj. Esperanto estis tiom proksime al sia triumfo, sed pro la kulpo de esperantistaj miopuloj ĝi tie en tiuj ĉi du grandaj landoj multon perdis. Jen kiaj estas la spertoj, kiuj instruas nin vidi la situacion tia, kia ĝi fakte estas. Ĉu ni esperantistoj en la popol-demokratiaj landoj ripetos la eraron de la tiamaj miopuloj, aŭ ĉu ni instruos nin el la dolorigaj spertoj? Kaj tamen aperas novaj miopuloj ankaŭ en nia nova, popol-demokratia Ĉeĥoslovakio, kiuj kredas, ke okazos ia granda miraklo, kiel tiu friponaĵo en la preĝejo de Ĉiĥoš. Mi kelkfoje diris al vi, samideanoj, ke neniu faligos nin, se ni mem nin ne faligos. — Tio signifas, ke ni devas malfermi la okulojn de ĉiuj miopuloj, ke ili vidu la situacion tia, kia ĝi vere estas. La oficialaj rondoj en nia patrujo subtenas nin, ili subtenas nin, esperante, ke ni servas al la patrujo, al la popolo, kiu per sia laboro, per sia Kvinjar-Plano, masonas pli bonan estontecon de nia popolo. Ili subtenas nian movadon, kredante, ke ni estas homoj progresemaĵoj, kiuj helpas la batalon por paco kaj harmonio inter la popoloj. Ili subtenas kaj favoras nin, kredante, ke ni per nia Esperanto servas al la internacia proletaro, kaj ne al la senbrida kosmopolitismo. Sed ili ne plu favorus nek subtenus nin, se ili ekscius, ke en niaj vicoj troviĝas homoj ne progresemaĵoj, kiuj per sia miopeco povus kaŭzi malfeliĉon ne nur al si mem, sed ankaŭ al la laborula popolo, al la nacio, al la Respubliko. La tempo urĝas por ni ĉiuj, troviĝantaj sur unu ŝipo. Faru ĉiu memkritikon, ĉu vi vere ne eraras kaj krimas kontraŭ Esperanto, se vi ne volas kompreni tiujn ĉi faktojn. Faru kritikon kaj memkritikon en la kluboj, ĉu vere ĉiuj samideanoj apartenas al niaj vicoj, ĉu ankaŭ tiaj, kiuj evidente vidiĝas nefavoraj al ĉiu nia bona ideo pri helpo per Esperanto al nia Respubliko, Faru kritikon en la Esperanto-societoj kaj izolu tiujn, kiuj ĝis nun kaŝe aŭ malkaŝe malakcelas nian laboron por la laborula popolo. Faru memkritikon tiuj, kiujn tiu ĉi artikolo multe kolerigos, ĉu ili restu en niaj vicoj aŭ libervole foriru. Tion vi faru, ĉar ni devas havi klaran celon: tio estas servo al nia patrujo, al la popol-demokratia Respubliko, servo per nia Esperanto, kaj ĉiam memoru la vortojn: „Neniu faligos nin, se ni mem nin ne faligos!“

## KRONIKO ENLANDA



Josef Krumpholtz

pioniro de nia movado inter ĉeĥoj, kunlaborinto pri lernolibroj de Ĉeĥa, eminenta pedagogo kaj renomita kolumnisto, naskiĝis 19. X. 1870, mortis 3. III. 1950.

„Esperanto-Servo“ plenumas ĉiam daŭre kaj ĉiam pli sukcese sian taskon informi fremdlandon pri ĉeĥoslovakaj faktoj kulturaj kaj ekonomiaj kaj pri niaj vidmanieroj politikaj. La numero dua el la tria volumo, redaktita sub signo de la dua datreveno de februaro 1948, estas precipe elstara pro multaj gravaj artikoloj, el kiuj ni citu aparte tiun de ministro por Enlandaj Aferoj Václav Nosek pri la februara venko de la ĉs. popolo kaj tiun de Stanislav Budín pri ministro Václav Kopecký, „tribunuso de la kulturo“, kiu havas unusolan malfortecon: daŭre provizi al artistoj de ĉiuj faktoj ĉian komforton, por ke ili kreu kulturajn, kiuj fariĝos por la popolo same komunaj kiel pano kaj akvo. Ni ne forgesu mencii la bonan lingvaĵon de tiu ĉi aktuala informbla bulteno de Praha. Kaj ni ripetu ĝian destinton: Ĝi ne restu kuŝi enlande, sed venu en fremdlandon, kies legantoj multon ekscios el ĝi.

„Kultura Revuo“ estas ciklostilitaj kajeroj, eldonataj de la eksterlanda sekcio de Komisiitejo por informoj kaj klerigo en Bratislava. Ĝi enhavas multajn tre sciindajn informojn pri slovakaj kulturaj el teatro, filmo, literaturo, scienco. La artikoloj estas destinitaj por aperi en fremdlandaj nacilingvaj gazetoj. Kvankam la bulteno ne aperas longe, jam venis dokumentoj pri bona uzo de tiu ĉi bulteno, kiu povus esti modelo por multaj. Ankaŭ per scio oni batalas por paco kaj kontraŭ milito.

Disaŭdiĝo de opero Najado (Rusalka) de Ant. Dvořák kun libreto de Jar. Kvapil estis prezentado, kiun oni povas nomi sen troiĝo epokfara. La opero estis dissendata en du partoj, merkredon la 5. IV. la du unuaj aktoj kaj merkredon la 12. IV. la tria akto ĉiam de la 23—24 horo. La teksto estis eminente tradukita de Tomáš Pumpr, ludis

radio-orkestro kondukata de Fr. Dyk, kantis radio-ŝoro kondukita de Jiří Pinkas, reĝisoris Dalibor Chalupa kun muzika reĝio de Jan Frýda, kantis membroj de opero de la Ŝtata teatro en Praha. Kiel diris estro de la Verda Stacio Ant. Slanina en sia fina alparolo, kunlaboris en tiu prezentado 140 personoj. La opero Najado estas ofte en repertuaro de la Ŝtata teatro en Praha, kaj la aktorantoj estis la samaj. Do alta nivelo de la kantoj kaj de la muziko ludita de same fama orkestro estas afero memkomprenebla. Sed tie ĉi ni emfazas la tre bonan adapton por disaŭdigo. Ne estis prezentita la opero kompleta, sed sole la ĉefaj kaj plej famaj partoj, uverturoj, solkantoj kaj ĥor-kantoj, kiuj estis kunligitaj per parolaj klarigoj, dirataj majstre de K. Höger kaj Jindra Holmanová. Tiu aranĝo tre helpis al komprenebleco de la opero, kiu versimile estis eĉ por tiu, kiu ĝin aŭskultis unuan fojon, almenaŭ tiom komprenebla kiel en teatro. La bona komprenebleco de Esperanto estis pruvita dum tiuj du horoj de muziko, kanto kaj deklamo unu foje pli. Al tiuj, kiuj konfirmas regule la aŭskultadon, sendis la Radio-stacio tekston de la traduko, 26paĝan ciklostilitan broŝuron, ĝi certe ĝojigis ĉiun nian amikon. Estu tie ĉi enpresita listo de kantistoj en tiu ĉi prezentado, kiu fariĝos ofte citata same kiel tiu de „Vendita Fianĉino“, en kiu aktoristoj el Brno antaŭ du monatoj: Princino Beno Blachut, Najado M. Tauberová, Nikso K. Kalaš, Sorĉistino L. Hanzalíková, Arbaristo K. Lajs, Kuir-lernanto Št. Petrová, Unua Driado M. Jirásková, Dua Driado G. Neumanová, Tria Driado D. Linhartová, Ĉasisto Bořek Rujan. Ĉiuj ludintoj akceptu dankon, la gvidanto de la Verda Stacio estu salutita kaj al la direkto de la Ĉs. Radio estu dirita senrezerva laŭdo pro ĝia progresema sintenado al uzo de nia lingvo. Nur historio tion juĝos laŭmerite.

## LINGVO

### Překlad 25. textu:

La tuta familio de Bojaroj estis familio de revuloj, de belaj, neenerĝiaj homoj. Preskaŭ ĉiuj atendis ĝis venos<sup>1</sup> la okazo<sup>2</sup> por proponi siajn servojn kaj fortojn. Ili ĉiuj estis freŝaj, ridetemaj kaj rozkoloraj.<sup>3</sup> Iliaj bluj okuloj havis ĉarmon de io revema<sup>4</sup> kaj ilia voĉo estis cedema,<sup>5</sup> necerta.

Nur antaŭnelonga,<sup>6</sup> la antaŭlasta generacio liberigis<sup>7</sup> el tiu eterna sklaveco. Ĝi loksidiĝis sur sia propra tero<sup>8</sup> kaj mastrumis.

La unuenaskita filo, Tóma, ŝajnis esti entreprenema kaj aktive fidele, rekta,<sup>9</sup> aŭdaca<sup>10</sup> en paroloj kaj prijuĝoj.<sup>11</sup> Nigra kiel korvo<sup>12</sup> — diference de siaj gefratoj — li heredis nur malmulton<sup>13</sup> kaj nur tion plej videblan el la romantikeco de sia gento: la amon al la malnova naskiĝ-urbo. La fratinoj iradis<sup>14</sup> tie kun maltrankviligitaj, rev(em)aj ridetoj; ankaŭ la pli juna frato, kavaliro de revo,<sup>15</sup> estis ĉi tie bone kaŝita en dometo staranta, kun ĝardeneto, sur la loko<sup>16</sup> de malnova muro de la urba fortikaĵo. Tóma heredis la tutan maltrankvilon<sup>17</sup> kaj konkeremon de sia patro, malgranda bienulo,<sup>18</sup> la ceteraj infanoj — ĉiuj malkontentecon de la romantikeco de la patrino. Tiuj ĉi vivis ĉi tie dum la tutaj vintroj kun la patrino, kaj somere<sup>19</sup> ili translokiĝis<sup>20</sup> al Tóma, la plej aĝa filo, al kampara bieno<sup>21</sup> en najbara regiono. En la urbo estis okazo por kleriĝi en literaturo kaj muziko. La urbo estis por ili gaja, floranta, kaj familio delonge enradikiĝis en ĝi per multaj amikaj ligoj.

Jam dum pluraj jaroj ili tiel vivis kaj nenio ŝanĝiĝis. La jaroj estis pasantaj, la pli aĝaj filinoj edziniĝis al la fianĉoj. La knabinoj maturiĝis<sup>22</sup> unu post la alia.

(Ant. Sova: Tóma Bojar.)

### Poznámky:

<sup>1</sup> prezentiĝos, troviĝos; <sup>2</sup> ŝanco; <sup>3</sup> rozvangaĵ; <sup>4</sup> reva, revoplena, revanta, enrev(iĝinta); <sup>5</sup> submetiĝema, fleksebla; <sup>6</sup> proksima; <sup>7</sup> liberigis sin, emancipis sin el; <sup>8</sup> usadiĝi se na svém, t. j. na svém nemovitém majetku; <sup>9</sup> sincera; <sup>10</sup> kuraĝa; <sup>11</sup> kuraĝa (aŭdaca) parole kaj opinie; <sup>12</sup> frugilego; <sup>13</sup> iomon; <sup>14</sup> ir-reiradis; nikoli trairadis = procházeti čím, skrz co; <sup>15</sup> revo, ne songo = sen ve spánku; <sup>16</sup> surloke

**Regiona konferenco kaj Jozefa vesperfesto en Hradec Králové** kunvenigis vespere la 19-an de marto en hotelo Avion 190 p. ne sole el Hradec Králové kaj ĉirkaŭaĵo, sed eĉ el malproksimaj lokoj: Plzeň, kiuj ĉeestis kun nederlanda samideano, salutinta partoprenantojn en la nomo de nederlandaj esperantistoj, Ĉ. Krumlov, Lanžhot, Svitavy, Mimoň, Trutnov, Úpice, Turnov, Ĉ. Skalice, Chlumec, N. Bydžov, Příbram, Hronov, Olomouc, Břeclav, Hořice ktp. La Centran Komitato reprezentis s-ano Rud. Hromada el Praha. Post inaŭgura malfermo fare de prezidanto J. Dolanský, sekvis valora programo, en kiu estis prezentitaj du unuaktaĵoj kaj precipe elstara programero de sorĉisto s-ano L. Lyznar el Čtyřicet Lánů. Post la programo amuziĝis ĉiuj en la amika kunesto ĝis 1-a horo.

Dimanĉe la 20-an je la 10-a h. okazis en Valek-restoracio laborokonferenco, kiun partoprenis 70 ĉeestantoj. Estis preparolitaj kun distriktaĵoj kaj lokaj perantoj aferoj koncernataj pluan laboron. S-ano Hromada respondis pluraĵajn demandojn.

**Korespondanton en Moskvo** havas regiona peranto en Ostrava s-o Vl. Slaný. Li ricevis de li jam plurajn korespondadojn, la lasta karto, kiun ni vidis, estas el 28. III. 50. La rusa amiko dankas sur ĝi pro sendo de presaĵoj de nia Instituto de E. Servo.

**Servuteco sur Kanariaj insuloj kaj ĝiaj sekvoj.** Tiun artikolon de nia amiko Juan Régulo Pérez tradukis Vl. Antoš kaj publikigis ĝin „Náš cíl“ en Brno la 6. I. (O. G.)

**La mondo de Islando ĝis Capetown legas pri slovakaj kulturo** estas tutpaĝa artikolo en paska numero de semajna revuo Nedel'a, Bratislava. Ĝi raportas pri sukceso, kiun havis la oficiala Kultura revuo, eldonata de la Komisiitejo por informoj en Bratislava. (O. G.)

de; <sup>17</sup> malkvieton; <sup>18</sup> etbienulo, bienposedanto; <sup>19</sup> en somero; <sup>20</sup> translokiĝis; „kaj ili translokiĝis“ lépe než „por translokiĝi“; „nebo „por ke ili translokiĝu“, nejde zde o účel; <sup>21</sup> en kamparan bienon; <sup>22</sup> plenkreskis.

Překlad 25. zaslali: Jar. Babička, Děčín; Bran. Hruška, Ostrava-Mar. Hory; Jar. Konečná, Brno; František Kuba, Olomouc; A. Macek, Bulhary; Jar. Mastník, Nelahozeves; Boh. Němeček, Dobřany; L. Rejthárková, Hradec Králové; Esp. Rondeto (J. Lederer), Šluknov; Ant. Schöblová, Beroun; Štěpánka Šumavanská, Praha; E. K. (Prokšíšková), Ústí n. Lab.; M. Wadasová, Olomouc. Celkem 13 čtenářů.

Uznáváme, že text byl poměrně nesnadný, tím více nás těší účast tolika nových překladatelů. Jejich práce byly téměř všemě dobré, některé výtečné.

Dosud jsme vylosovali z nejlepších překladů a autoru zaslali jako skromnou odměnu knížku. V posledním případě dostalo se nám nezdrovilých výtek, že posíláme jen brožurku místo knihy. Za překlad 20—25 řádek nemůžeme ovšem posílati knihu o několika stech stranách, tím spíše ne, že máme nedostatek literatury, jak je známo všem, kteří sledují naše zprávy. Ponecháváme tedy našim čtenářům rozhodnutí, zda budou překládat pro cenné cvičení, i když se jim nedostane uznání knižního. Hmd

### Překlad 26. textu:

Jes, mi volus, ke ne estu forgesitaj<sup>1</sup> la kamaradoj, kiuj fidele kaj kuraĝe batalis ekstere kaj ĉi tie, kaj kiuj falis.<sup>2</sup> Sed mi volus, ke ne estu forgesitaj eĉ<sup>3</sup> la vivantaj, kiuj helpis nin same<sup>4</sup> fidele kaj same<sup>5</sup> kuraĝe en kondiĉoj plej malfacilaj. Ke el la duonlumo<sup>6</sup> de la koridoroj de Pankraz eliru en la lumon de la vivo tiaj figuroj kiel Kolínský kaj kiel ĉi tiu ĉeĥa gardisto.<sup>7</sup> Ne por<sup>8</sup> lia gloro. Sed por<sup>9</sup> ekzemplo al la aliaj. Ĉar la homa devo ne finiĝos per tiu ĉi batalo, kaj esti homo signifos ankaŭ plue postuli<sup>10</sup> heroan koron, ĝis la homoj estos<sup>10</sup> tute homoj.

### Poznámky:

<sup>1</sup> vĕta vedlejší „aby nebyli zapomenuti“ je předmětem věty hlavní „mi volus“. Proto je uvedena spojkou „ke“.

nikoli „por ke“, jež uvádí věty účelové. Nikoli „forĝes-otaj“ (= před zapomenutím); <sup>2</sup> stačí místo: mortfalis, baltfalis; <sup>3</sup> nikoli „nek“, které možno použít jen ve spojení ani — ani nek — nek. Samotné „ani“ je „eĉ ne“; <sup>4</sup> ne malpli; <sup>5</sup> duonkrepusko; <sup>6</sup> policisto; <sup>7</sup> nikoli: pro. Smysl zde je: ne aby byli slavní, nikoli: protože jsou slavní; <sup>8</sup> sed kiel ekzemplo; <sup>9</sup> kaj esti homo postulos eĉ plue; <sup>10</sup> dum la homoj ne estos tute (plene) homoj. Nikoli: ĝis la homoj NE estos — tak dlouho až lidé nebudou lidmi.

Překlad zaslali: Jiří Bartoš, Praha; Aug. Blahutka, Vsetín; Alois Bobek, Turnov; Klem. Hlobilová, Olomouc; Zdeněk Hršel, Hradec Králové; Ada Jermářová, Ostrava-Mar. Hory; Emil Klímš z a, Dolní Suchá; Vlad. Kočvará, Rokycany; Jar. Konečná, Brno; Al. Kozárek, Skrbeň u Olomouce; Frant. Kuba, Olomouc; Jos. Lederer, Sluknov; A. Macek, Bulhary; Jar. Mastník, Nelahozeves; Gustav Menšík, Plasy u Plzně; Boh. Němeček, Dobřany; Josef Odehnal, Gottwaldov; Lida Rejthárková, Hradec Králové; A. Šmoldasová, Olomouc; M. Šreiberová, Zdoňov u Teplic nad Met.; E. Klubo (Prokýšková), Ústí n. L.; Milan Vitovský, Gottwaldov; celkem 22 překladů.

I zde objevují se noví překladatelé, někteří z nich velmi dobří, jiní slibní. Přáli bychom si, aby jejich počet stále rostl.

## 27. úkol k překladu:

Nastal konec světa, a pět lidí, kteří jej přežili, sedí u stolu, bile prostřeného ještě před katastrofou — výsměšný znak bývalého míru — pod lampou, vysílené svítili, pět lidí, matka bitovské rodiny, Venta, Háta, Rosa a Martin, stařenčina ruka spočívá konejšivě na zatáté pěsti synové a Martin vypráví a vypráví, slova, řinoucí se mu z úst jako krev z rány, jsou úlevou jemu i jim, ještě jednou v nich ožívá sen, ještě jednou se vrací kouzelný dům z předluďné minulosti do neúprosné skutečnosti prostřeného stolu, na němž nedopité sklenice vody, slánka, chléb, nakrájený na lýkové misce, jsou jako pozůstatky života jiných lidí, kteří tu ještě nedávno spokojeně žili a z nějakého důvodu odešli. A pak přichází potulný kejklř se svým Světem divů, Martinova slova roztrhává křeč, železný válec osudu se dává do pohybu, křeč stříká z drčeného srdce, Josefova tvář tvrdne, Hátiny rysy se zachvívají a paní Baldvínová bledne, studená ruka sahá jí po duši, neboť v duchu vidí vrbovou větev, zlověstně třící do prázdna.

K. J. Beneš: Kouzelný dům, 346.

## Karolo Piĉ: Ilija belsoneco

Pri esperantaj neologismoj oni parolis jam sufiĉe ofte kaj ofte. Estis prezentataj la plej diversaj motivoj, ĉi aprobaj, ĉi malaprobaj. Tamen nur super primavero, trobadoro kaj kelkaj aliaj enkondukaĵoj estis iom menciita ankaŭ la demando de la belsoneco, ĝis tiam preterlasata kaj neglektata. Ĉar ĝi (la belsoneco) estas afero sendiskute tiom relativa, ke oni apenaŭ povus fari ian definitivan kaj absolutan konkludon aŭ prijuĝon. Kaj se oni tamen volus solvi la demandon ĉiapreze, ni timas, ke la decido neeviteble estus tro relativa kaj tro personĝusta.

Siatempe oni multe parolis pri la plurala finaĵo —j. Oni akre kritikis ĝin, asertante, ke ĝi estas barbara, nebelsona kaj neestetika. Tamen al la greka lingvo la sama j donas multajn el ĝiaj specialaj ĉarmoj kaj belecoj. Ankaŭ la konjunkcio kaj, la akuzativa finaĵo —n kaj multaj aliaj ne evitis akrajn malaprobajn. Tamen nun ĉiuj ĉi vortoj kaj finaĵoj jam plene hejmiĝis en la lingvo kaj ili neniel ofendas ies orelojn aŭ muziksenton.

Same pri printempo kaj trubaduro. Ankaŭ ili neniel ŝokas ies aŭdopovon. Cetere ni timas, ke en la nuna tempo ne nur ni, sed eĉ nia lingvoscienco esperanta ne kapablas decidi, kiu el la vortduopoj primavero — trobadoro aŭ printempo — trubaduro estas

pli ĉarma kaj belsona, ĉar mankas stabilaj kaj absolute definitivaj kriterioj pri tio.

Kaj ni ne forgesu, ke ofte la sama vorto, belsona ekzemple por la oreloj de anglolingvano aŭ Germano, povas esti ekstreme malbelsona por la oreloj de Greko aŭ Italo. Kaj kontraŭe tio, kio estas agrabla al la oreloj de ekzemple Hispano, ne ĉiam aŭtomate plaĉas ankaŭ al la aŭdanto de Anglo aŭ Slovakoj.

La fundamento de ĉiu beleco estas la interna harmonio de ĉiuj elementoj, kiuj konsistigas la tutajn. Kiel belan oni do rajtus konsideri nur tiun vorton, kiu ne rompas tiun internan harmonion de la lingvo, sed grandigas ĝin, aŭ almenaŭ konservas ĝin senŝanĝe.

Esperanto estas lingvo grandparte latinida. Sed ĝi enhavas ankaŭ elementojn anglidajn kaj slavajn. La Esperantoscienco iutage devos esplori ĉiujn rilatojn kaj proporciojn de tiuj ĉi elementoj, kaj starigi laŭprocente iliajn influojn kaj efikon.

Se Esperanto ekzemple konsistus 60-procente el elementoj latinidaj, 30-procente el elementoj anglidaj kaj 10-procente el elementoj slavaj, tiam oni povus konsideri kiel harmonian kaj belan nur tiun vorton, kiu ne estus rompanta tiun ĉi strukturon. Tio signifas, ke el ĉiuj 100 novaj vortoj (ĉu neologismoj, ĉu fakterminoj) 60 devus esti latinidaj, 30 anglidaj kaj la restantaj 10 slavaj.

Sed Parnasa Gvidlibro, la glora neologismoaro de Kalocsay, niaopinie tiun ĉi harmonion ne nur ne konservas, sed reverzas. Ĉar en ĝi superregas elementoj latinidaj, kaj tiuj okupas la tutan kampon kaj terenon malfavore al la elementoj aliaj. Sed simile ne konservas la harmonion de Esperanto ankaŭ ĉiuj fakaj terminaroj, publikigataj ĉiujare en la jarlibroj de UEA. Ĉar en ili kontraŭe superregas elementoj anglidaj.

Tiel ekzemple en la Terminaro por infanludoj, eldonita de IEL en 1942 en Rickmansworth, troviĝas badmintono, basbalo, boks, faŭli, futbalo, golo, handbalo, hokeo, kriketo, kroketo, maĉo, netbalo, rugbeo, sprinti, starti, stulbalo, triktrako, vido kaj aliaj, kiuj estas tute anglaj vortoj, nur iomete esperante vestitaj. Simile boardi, vejri, lofi, grondi, kutro, jacto, drednaŭto, destrojero, pakboto, tram-po, vrako, trejni, klipero, asdiko, blokhaŭso kaj aliaj de la Marista terminaro, verkita de Komandanto Peter Clissold, D. B. E. A., kaj aperinta en la dua parto de la jarlibro 1949 de UEA, estas tute anglidaj. Tamen restas demando, ĉu oni vere povus riproĉi la aŭtorojn de tiuj terminaroj pro tio. La angla lingvo posedas la plej perfektan nomenklaturon sportan kaj maristan (eĉ ne parolante pri la aliaj). Tiu nomenklaturado estas ofte netradukebla alilingven. Ankaŭ la ĉeĥa lingvo, kvankam tute malparenca, uzas senŝanĝe multajn tiajn vortojn kiel goal, hockey, match, rugby, sprint, start, dread-nought, tramp ktp., eĉ ne modifante ilian fremdan, anglan ortografion. Ĉio ĉi do plene pravigas la enkondukon de tiuj radikoj en Esperanton. Sed ĝi neniel solvas la problemon.

Ĉar se tiu ĉi evoluo daŭrus, Esperanto iutage prezentus sin kun tute alia strukturo, ol estas tju, kiun ĝi havis kaj havas ĝis nun. Kaj ni timas, ke tio estus, interalie, rekta sekvo ankaŭ de tio, ke ĝia strukturo kaj la ĝisnuna interna harmonio de ĉiuj ĝiaj diverslingvaj elementoj estis ĝis tiam ĉi malmulte konsiderataj kaj de la oficiala lingvoscienco, kaj de la unuopaj lingvoparolantoj.

La plej multaj kontentiĝas, aŭdante, ke Esperanto estas lingvo latinida. Sed tio estas vera kaj ne vera. Esperanto estas lingvo franclatina, sed ne hispanitala (Parnasa Gvidlibro kontraŭe estas hispanitala!); kaj tio estas nepre diferenca!

Se ni volus precize scii, kia Esperanto estas, ni eĉ devus diri, ke ĝi estas slav-german-anglo-franc-latina. Kaj nun la lingvoscienco diru al ni, kiomgrade slava kaj germana kaj angla kaj franca kaj latina ĝi estas.

Tuj, kiam la scienco donos al ni definitivan respondon pri tio, ni ne nur precize konos la strukturon de Esperanto, sed ni eĉ kapablos konservi kaj pluporti ĝin; kaj ni scios definitive decidi, kio estas bela aŭ nebela (ĉar harmonia aŭ ne harmonia).

Sed ĝis tiam ni nur palpserĉos nian vojon en nebuloj kaj mallumo.

# NI LEGIS

**Kion oni diras pri la Esperanto-radio-elsendoj.** Ni legas en Heroldo (n-ro 4): Aŭskultanto en Hungario sendis al ni kelkajn rimarkojn pri sia ricevado de Esperanto-radio-elsendoj. Jen ili mallongigite:

Bern: Ne bone ricevebla (en Hungario).

Ĉeĥa kaj Pola: Ricevo sufiĉe bona, precipe la ĉeĥa. Pri la Verda Stacio nur laŭdegoj en plej alta superlativo.

Graz: Bone aŭdebla; elparolo senriproĉa.

München: Bone aŭdebla.

Parizo: Tre ŝatata, precipe la merkredaj elsendoj (leterkesto).

Sofia: Ricevo foje bonega, foje malbonega. Enhavo enuiga. „Mi ŝatus aŭdi ion novan, interesan.”

Sveda: Plaĉa kaj bonega programo. Ricevo bona nur per ondoj 27,83 kaj 49,46.

En numero 6 (16 marto) estas enskribitaj spertoj de Finna aŭskultanto. Ni citas kelkajn:

Parizo aŭdiĝas ĉi tie nuntempe relative malbone; bedaŭrinde, ĉar la programoj estas tre interesaj.

Praha: La mezonaj stacioj aŭdiĝas bonege; el la sendoj de la Verda Stacio la opero „Vendita Fianĉino” estis bonega.

Stockholm aŭdiĝas tre malbone (pro troa proksimeco), sed la programoj estas bonegaj.

**Bildojn de ĉefaj kunlaborantoj de la Verda Stacio** publikigis en sinsekvaj kajeroj Heroldo de E. Estas portretoj de gvidanto de la Stacio Ant. Slanina, reĝisoro Dalibor Chalupa, ĉefo de la Literatura Fako de Ĉeĥoslovaka Radio, kaj ĉefo Marta Šmidrkalová, kiu tradukas korespondaĵojn de la aŭskultantoj kaj por la aŭskultantoj.

„**Kio estas Rotario-Klubo**” titolas ciklostilita broŝuro 24-paĝa 21×25 cm, eldonita de „Komitato por Internaciaj Servoj, Rotario-Klubo de Te Awamatu, Novzelando”. Sendinto Rotariano A. J. Sinclair, poŝtkesto 40. La broŝuro donas skizon pri historio de Rotario-Klubo. La unua estis fondita 1905 en Ĉikago kaj jam en 1912 estis fondita „Internacia Asocio de Rotario-klubo”, kiu depost 1922 nomiĝas „Rotario Internacia”. Nuntempe (1949) 6859 Rotario-klubo en 50 landoj havas 331.000 membrojn, homojn komercajn kaj profesiajn.

**La spertoj de pluraj lingvoesplorantoj en Esperanto** montras la samajn fazojn de evoluo: admiro por la logiko kaj la simpla gramatiko; konstato, ke la logiko tamen ne estas rigore obeata, kaj ke la gramatiko havas mankojn; klopodoj esprimi sin plej eble logike, kaj korekti la gramatikon; pasia, eĉ fanatika, defendado de propraj eltrovoj; konstato, ke ankaŭ aliaj akiris similajn spertojn, sed venis al aliaj solvoj; konsciigo, ke ne ĉiuj solvoj estas egale realigeblaj; kaj fine rezigno pri realigebleco de propraj solvoj. En tiu lasta stadio ni konsciigas, ke niaj konceptoj fontis parte el niaj propraj sentoj, kaj ke ĉiuj niaj klopodoj finfine havis kiel precipan celon: veni al tiu ĉi rezigna konstato. („Esperanto kaj sentoj” en La Progresanto, 15 febr. 1950.)

„**Heroldo de Esperanto**” en aprilo 1950 aperas tridek jarojn. La eldonanto kaj redaktoro Theo Jung akceptu nian gratulon kaj dankon pro sia persista laborado. Tiaj jubileoj ne estas sole faktoj konsolaj sed ankaŭ faktoj pruvantaj vivantecon de nia movado. Ĉio kio vivas akiras sian tradicion.

**La pertelefona traduksistemo**, instalita en la Tria Internacia Kongreso de la Mondfederalistoj en Stockholmo 29. aŭg.—4. sept. 1949, kostis por unu semajno 4000 dolarojn. Uzo de Esperanto estus estinta certe rimarkinde pli malmultekosta. (Laŭ La Praktiko, okt.—nov. 1949.)

„**Homoj kontraŭ dezerto**” estas devizo, per kiu atentigas Unesco pri sia entrepreno turni atenton al problemoj fekundigi dezertajn terenojn de nia planedo, da kiuj estas ĉirkaŭ triono de la tersurfaco. Unesco komisiis sciencan ĵurnaliston Ritchie Calder fari esplorvojaĝon laŭ la marbordaj regionoj de la Norda Afriko. Liaj artikoloj aperas en News Chronicle kaj iliaj resumoj kun bildoj en ĝenerala „Esperanto”. Unuan fojon en la historio ricevis esperantista gazeto ekskluzivan rajton partopreni en mondskala oficiala afero.

## VIII. sjezd československých esperantistů v Brně 27.—29. května

bude významná manifestace. Už je přihlášeno více než 700 účastníků. Přečtete si pozorně Raportu pri agado 1949, přiložené k tomuto číslu! Při příchodu do Brna hlase se v přijímací kanceláři, jež bude fungovat v sobotu od 8 do 19,30 hod. vedle hlavního východu z nádraží! Na shledanou v Brně!

### Ĉlenŭm v roce 1950!

Nalepte si do legitimace členské kvitanční známku otisknutou v tomto čísle na poslední straně dole.

## KORESPONDI DEZIRAS

Břetislav Čaň, 21-jara ledaĵisto, Vodní 257, Vyškov 2, dez. intš. pm. kun ĉiuj landoj.

Zdeněk Vachůn, 17-jara studento, Hranická 474, **Va-lašské Meziříčí**, kun ĝejnuloj.

F-ino Maria Arsova, str. Zavoja na Černa 9 Pavlovo, **Sofia**, Bulgario, 20-jara ĝaja oficistino, bruneta, amanta la sporton, kun juna samideano, ŝatanta la muzikon.

S-ino Violeta Maĝarska, ministerio de enlanda komerco, **Sofia**, Bulgario, juna oficistino, lernanta la muzikon, kun juna familio ŝatanta muzikon.

František Jíra, Elektrosvit, **Šluknov**, kun ĉiuj landoj, letere aŭ poŝtkarte pri ĉiuj temoj.

Fratulino Josefina Marečková, verkistino, starobinec, **Holič**, Slovakio.

22 bulgaraj samideanoj — skribu al Lalju C. Lalev, **Berievo**, Sevlievsko, Bulgario.

B. Enomoto, Saikamati, **Singu**, Wakayama-ken, Japanio, pri moroj kaj vivo, intš. pm.

F-ino D. G. Vis, **Giethoorn** — Zuid, Nederlando.

J. Kors, **Wilemsoord** 16, Nederlando.

Josef Kulkus, 20-jara asistento en drogejo, **Mohelnice** na Moravě, serĉas amikan koresp. kun tuta mondo, ankaŭ kun ĈSR.

S-ro Vladimír Směkal, 15-jara studento, Na Hrádku 637, **Tišnov u Brna**, ĈSR, kun ĝesperantistoj junaj, sed eĉ kun maljunaj, el ĉiuj landoj.

S-ro Kaichiro Fujihara, 18-jara studento en Scienca Fakultato de Universitato **Okajama** (Japanujo).

F-ino Emiko Kamiya, 17-jara gimnaziano, PM, PL, portretoj kun ĉs. amik(in)oj. Kooyamachi 2-II, **Kumamotokyoku-kunai**, Japanujo.

S-ro Kaichiro Fujihara, 18-jara studento en Scienca Fakultato de Universitato **Okajama** (Japanujo).

F-ino Emiko Kamiya, 17-jara gimnaziano, PM, PL, portretoj kun ĉs. amik(in)oj; Kooyamachi 2-II, **Kumamotokyoku-kunai**, Japanujo.

Prof. Dr. Io Chou, Prezidanto de „Instituto Entomologia de Chou”, Chang-Chia-Kang, Shensi, Ĉinio, fervore kolektas la ekspoziciaĵojn de Esperanto (t. e. Esperantaj ĵurnaloj, libroj, simboloj, medaloj de verda stelo, ŝlosiloj de Esperanto, vortaroj Esp.-nacilingvaj k. nacilingva-Esperantaj, bildoj de ĉiulandaj kostumoj, Esperanto-movado ktp.), kaj recipokos al sendinto la egalvaloran ĉinan aĵon laŭ lia deziro.

Lída Slovanová, 18-jara oficistino, Karlova 204, **Nový Bydžov**, ĈSR, kun tuta mondo.

Jana Lováková, 19-jara oficistino, náměstí, **Nový Bydžov**, ĈSR, kun tuta mondo.

Josef Kulkus, 20-jara drogeja asistento, **Mohelnice**, ĈSR, serĉas amikan korespondadon kun ĝesamideanoj el tuta mondo, ankaŭ el ĈSR.

„Ni ricevis tiom da leteroj, ke ni ne povas respondi al ĉiuj skribintoj. Pardonon! T. Arijasu, K. Kawabe, M. Otsuka, ĉiuj el Osaka, Japanujo. Alvenis pli ol naŭdek leteroj.” — Tiun leteron ni ricevis de japana samideano M. Otsuka (kies nomo estis en nia gazeto erare presita M. Cotuma) kaj li aldonas la jenan atentindan frazon: „Ni estas tute surprizitaj, ke ĉiuj letersendintoj el via lando estas komencantoj.”

Sekvas la instruo: Ellernu la lingvon!

## SCIIGOJ

Aldono al ĉeĥa-esperanta vortaro de Filip estas ankaŭ aparte havebla — por Kčs 2,80 afrankite — ĉe nia Libro-vendejo.

**Najado**, opero de Antonín Dvořák en traduko de Tomáš Pumpr. Kelkaj ekzempleroj de tiu valora traduko (mult-obligaĵo) estas ankoraŭ acetebraj ĉe nia Libro-vendejo, Prezo Kčs 24,— afrankite.

**Literatura Mondo 1949**. Ni ricevas informon, ke la mankantaj numeroj de la pasinta jarkolekto ne povos aperi. Libro-vendejo de EAĈSR repagos la koston de tiuj numeroj al ĉiu, kiu tion postulos.

**Ekzamena Komisiono** kunsidos ĉe finoj de ĉiuj tiujaraj Someraj kursaroj, do en Doksy la 30. VII., en Rožnov p. Radh. la 29. VII. kaj en Karlovy Vary 19. VIII. Celo de tiuj kunsidoj estas ebligi al frekventintoj de kursaroj aŭ de proksime loĝantaj kandidatoj subigi al ekzameno. Kompreneble la ekzameno ne estas deviga finiĝo de la kurso, ĝi estas tute laŭvola. Kandidatoj por la unuagrada ekzameno (pri scio de la lingvo) povas sin anonci ankorau dum la kursaro. Sed kandidatoj por la duagrada ekzameno devas sin anonci antaŭ la kursoj, ĉar ili devas verki hejman taskon kaj prezenti ĝin al la komisiono 20 tagojn antaŭ la ekzameno. Kiam la hejma tasko estas aprobita, ili povas lasi sin ekzameni ĉe ĉiu ajn kunsido de la komisiono. Aliĝojn sendu al sekretario de la komisiono Dr T. Pumpr, Verdunská 8, Praha XIX.

**Internacia Kulturo** estas en malfacilaĵoj ĉefe pro papermanko kaj aperas tial lastatempe kun konsiderinda malfruiĝo. La alvenintajn abonojn ni tuj transdonas al la eldonejo. Tiun klarigon akceptu la abonintoj, kiuj plendis ĉe ni pro nelivero de la revuo.

**Skribu vian kompletan adreson** korespondante kun la Asocio aŭ pagante al ĝi! Mendante ion por loka grupo, notu klare, al kiu adreso ni direktu la sendaĵon (gazeton ktp.). Agante tiel, vi ŝparos multan laboron al nia oficejo kaj al ĝiaj helpantoj.

**N. E. A. en Dolní Suchá** aranĝos esperantan ekspozicion la 25. VI. Bonvolu sendi por tiu celo librojn, broŝurojn, gazetojn, bildkartojn ktp. al adreso: Klimsza Emilo, Dolní Suchá II. 30, Těšínsko, ĈSR.

## Esperantské léto v Karlových Varech

Příjemnou a zároveň velmi užitečnou dovolenou můžete strávit lacino a v radostném esperantském prostředí ve světových lázních Karlových Varech. Můžete tak posílit své zdraví i své znalosti esperanta, zúčastnit se Mezinárodního filmového festivalu, Karlovarského kulturního léta atd. Získáte tak zážitky nezapomenutelné. — Přihlaste se proto ihned do některého z těchto kursů:

Od 9. do 22. VII.: Kurs esperanta pro začátečníky.

Od 23. VII. do 5. VIII.: Konversacia kurso por progresantoj.

Od 6. do 19. VIII.: Supera kurso por kursgvidontoj.

Denně 4 hodiny vyučování, zbytek dne výlety, účast na lázeňském životě a p. — Výlety do nádherného okolí. — Poplatek za kurs 1.800 Kčs včetně ubytování v pensionu, stravování, kursového, vstupného na kulturní a zábavní podniky kursu a autokarového zájezdu do západočeských lázní. Pro pracující a studující mládež poplatek pro začátečnícký kurs 1.000 Kčs. — Vyučují členové zkušební komise Svazu esperantistů ĈSR. O zahraniční účastníky se vyjednává. — Přihlášky přijímá odb. učitel Antonín Reček, Karlovy Vary, Stálinovo náměstí 5, kde obdržíte též podrobnější informace.

Krajský výbor Svazu esperantistů ĈSR, kraj Karlovy Vary.

## Somera kolegio de Esperanto en Doksy 15.—29. VII. 1950

IV. zpráva:

Přečtěte si I., II. a III. zprávu, uveřejněnou v č. 1—4 časop. „Esperantista“! — Zajistěte si přijetí do kursů přihláškou se současným zasláním kolejného (školné, ubytování v soukromí, stravování 3× denně, vstupné do společenských podniků a j. služby) ve výši 1494 Kčs. — Kolej ubytuje pouze své žactvo. — Ubytování počíná ve 12 h. 15. VII. a končí o 12 h. 29. VII. — Kandidátům zkoušek opatří se nocleh na 29. VII. za příplatek 30 Kčs. — Příslušné potravinové listky třeba předložit.

Prozatímní program: 15. VII. o 21 h. informační večírek v nové restauraci u jezera. — 17.—29. VII. od 8 h.—12 h. vyučování a přednášky v kursech, seminári a cyklu. — 19. VII. odpol. výlet na hrad Bezděz s tancem v restauraci pod B. — 23. VII. celodenní autokarový výlet žactva (hrad Kokořín, Mělník, Říp, Litoměřice) — 25. VII. Umělecká akademie. — 27. VII. benátská noc na jezeře. — 28. VII. IV. letní karneval na rozloučenou?

U příležitosti kursu konati se budou I. řečnické závody o ceny na téma „Esperanto kaj la mondopaco“ a literární soutěž „III. Květinové hry“. (Informace a podmínky obou viz v č. 2.—3. oběž. „Verda voĉo“! Žactvo účastní se jedno odpoledne pracovní brigády.

Veškeré platby (kolejně 1494 Kčs, po př. jízdné autokar. 200 Kčs a 30 Kčs příplatek za nocleh 29. VII.) činite současně bianko-složenkou neb platenkou pošt. spoř. na šek. účet č. 729.501 Okres. spoř. a záložny v Doksech s poznámkou „Letní kolej esperanta“.

Vyzádejte si prospekt s ofic. přihláškou u jednatele LKED p. K. Šolce, Mladá Boleslav I. 41. — Informace o letních kursech esper. ve Svitú ve Vys. Tatrách (5.—19. VIII.) podává p. M. Novák, poštímistr ve Svitú 11, Slovensko. L. K. E. D.

## ESPERANTISTA VIVO

**Mortis Josef Springer**, librokomecristo en Praha, nia malnova membro, la 15. XII. 1949. Eksciante tion nur nun ni informas pri tio multajn liajn amikojn kaj konatojn kun profunda malĝojo.

**František Kučera**, malnova esperantisto en Ústí n. Lab., atingis en marto sian sesdekan jaron. Li aktivis precipe antaŭ la unua mondmilito. El negranda vilaĝo Kněževes apud Rakovník, kie li tiam vivis, li direktis vastan propagandon por nia lingvo kaj precipe por UEA.

## II. letní kursy esperanta v Rožnově p. Radhoštěm

budou letos od 15. do 29. července:

1. Kurs pro začátečníky.
2. Kurs pro pokročilé.
3. Supera kurso por kursgvidontoj.

Poplatek za kurs včetně stravování a ubytování společného, v soukromí nebo v hotelu činí 1450—1750 Kčs.

Přihlášky přijímá a informace podává:

s-anino Marie Skařupová, Ostrava I, ul. 1. máje 104.

## „Prodaná nevěsta“

v esperantu

bude vysílána znova 7. června. Překlad dr. Pumpra za 10 Kčs vyplaceně v knihkupectví Svazu.

Objednejte včas!

## Teorio de artefaritaj lingvoj

La lastaj tri jarcentoj aperigis ĉirkaŭ 500 projektojn de artefaritaj vortlingvoj kaj skribsignolingvoj por internacia uzo. Jam tiu fakto mem atestas, kiom oni sentas bezonon de internacia lingvo. Sed nur parto de tiuj projektoj estas ellaborita pli malpli komplete. Laŭ ilia konsisto ili povas esti klasigitaj en du kategoriojn: sistemoj aprioraj kaj aposterioraj.

Aprioraj sistemoj konstruas la lingvon sen rilato al la naturaj lingvoj el elementoj trovitaj kiel plej taŭgaj pro mallongeco, logikeco, elparolebleco, klareco, simpleco por diverslingvanoj. Ili klopodas difini nociojn<sup>1</sup> de la homa pensaro kaj parolo kaj trovi por ĉiu nocio unusolan vorton, kiu redonus ĝian signifon kun absoluta klareco, malobliganta iun ajn duoblecon de senco. Estiĝo de tia lingvo havus krom celo interkompreniga ankaŭ celon ordigan,<sup>2</sup> ĝi helpas al pli alta grado de homa penso kaj parolo. La reciproka rilato inter la ideoj estus kontrolata kaj redonata en pli bona logiko ol tion ebligas lingvoj naturaj. Tial estas nomataj tiaj lingvoprojektoj filozofiaj. Aperis vico da ili. La unua provo de artefarita lingvo en letero de René Descartes al P. Mersenne, la 20-an de novembro 1629, apartenas en tiun ĉi kategorion.

Kiel ekzemplo estu donita „Blaiia Zimonda!” de C. Meriggi el 1884. Ĉiu sono (vokalo aŭ konsonanto) respondas al iu ĝenerala ideo: a esprimas: granda, alta, forta, blanka, antaŭen, etendiĝo; i: malgranda, delikata, meza, enhavitaĵo; u: malserena, malproksima, estinta; p: forto, pezo, premo, bato; k: firmeco, fidineco; l: likveco, fleksibleco, elasteco; r: bruŭo, rotacio, movado, rapideco ktp.

Kombinitaj literoj havas derivitajn signifojn: il: likvaĵo, bl: parolo, kr.: ilo, maŝino.

Kl: konstruaĵo, klam = domo, klem = dormejo, klim = kabineto, klom = gastejo.

Blar = paroli, blaia = lingvo.

Ne mankas spriteco al tiu sistemo, sed ellerno de la vortoj estas tre malfacila malgraŭ la logika sistemo de derivado. La aŭtoro mem forlasis sian ideon kaj en 1911 aliĝis al „Academia pro Interlingua” kaj en 1911 aperigis broŝuron alvokantan subteni la novlatinan projekton de universala lingvo.

Prometej Prosvetilej de D-ro Eŭgeno Gurin, aperinta 1896-98 en Kiev kun gramatiko „ellernebla en daŭro de 5-10 minutoj” kaj vortaro en kiu la vortoj estas derivataj laŭ sekvanta ekzemplo: **Patro** = p-aj, **patrino** = p-aja, **filo** =  $\frac{1}{2}$  p-aj, **filino** =  $\frac{1}{2}$  p-aja, **nepo** =  $\frac{1}{4}$  p-aj, **nepino** =  $\frac{1}{4}$  p-aja.

Spokil de D-ro A. Nicolas el 1904 donas al literoj kaj silaboj difinitajn simbolajn sencojn kaj derivas el ili vortojn laŭ kunligiteco de la ideoj. La vokaloj metitaj kiel prefiksoj indikas gramatikan kategorion de la vortoj: a — substantivoj, e — verboj, i — prepozicioj kaj konjunkcioj, o — adjektivoj, u — adverboj. La vortoj estas kreataj el literoj posedantaj signifon de ideoj. Ekz. „r” karakterizas: fermo, kaŝi, vesto, haŭto, litkovrilo, ĉirkaŭe. El tio kreiĝas signoj por ideoj pli komplikaj kaj pli konkretaj: rb = ideo de laboro, rg = ideo de energio, rk = ideo de cirklo; sed ankaŭ ideoj „paralelaj”: gr = ideo de gravuro kaj preso, kr = ideo de milito, ktr = ideo de elektro. Logikeco estas malfacile trovebla. La propagando de Spokil daŭris ĝis 1914.

Ni enskribu ankoraŭ pluajn nomojn de aprioraj lingvoj: *Zahlensprache* de F. Hilbe el 1901, *Völkerverkehrssprache* de C. Dietrich el 1902, *Perio* de M. Talundberg el 1904, *Ro* de P. Forster el 1908, *Molog* de De-Sarranton el 1911, *Ao* de V. L. Gordin el 1920, *Loga* de G. Nield el 1927.

Plej bonan bildon pri ilia vortkrea metodo prezentas ekzemplo donita de E. Wüster en „Konturoj de la Lingvo-normigo en la Tekniko”: La filozofiaj aŭ aprioraj lingvoj starigas genealogian arbon de ĉiuj nocioj, kies apartajn branĉojn kaj subbranĉojn ili poste numeras per la alfabeto [ba „ajo”, bab „elemento”, babbac „heliumo”].

Kvankam oni dediĉis al problemoj konstrui aprioran lingvon multon da sprito kaj sistema laborado, praktika rezulto estis preskaŭ nula. La mondo ne povis akcepti tiajn lingvojn parte pro malfacileco sed precipe pro tio, ke kompleta analizo de nociaro aperis praktike neebla. Unu el kaŭzoj de tiu neebleco estis versimile ankaŭ daŭra kresko de ideoaro, neebleco de fiksa ideo-sistemo, kvankam ĉiu rekonas utilecon kaj praktikecon de vorttrezoro, kies vortoj estus interligitaj laŭ leĝoj aŭ postuloj de formala logiko.

Aposterioraj sistemoj kreas sian gramatikon kaj vortprovizon el naturaj lingvoj klopodante trovi elementojn komunajn al ĉiuj aŭ al multaj lingvoj, bazante precipe sur elementoj nomitaj internaciaj. El tio rezultas projektoj, kiuj ne estas tiom logikaj kiel tiuj aprioraj sed kiuj estas multe pli facilaj. Kompreneble ankaŭ tiuj sistemoj strebas al logikeco, sed en ili eĉ la logiko helpas al la facileco. Kronologie unua inter ili estas skizo de lingvoprojekto verkita de J. Amos Komenský en lia verko *Panglotia* en 1660.

En kategorion de la aposterioraj apartenas lingvoj, kiuj estis kreitaj nur per simpligo de iu natura lingvo. Inter ili la plej konataj projektoj estas du:

*Latino sine flexione* de G. Peano el 1908, kies vortaro estas preskaŭ senescepte latindevena kaj gramatiko kaj fleksio estas anstataŭitaj per vortordo en la pozicio.

*Basic English* de C. K. Ogden el 1932. Ĝi diferencas de la ordinara angla lingvo nur per tio, ke ĝi el la granda angla vortrezoro akceptas sole 850 vortradikojn kaj helpe de ili ĉirkaŭfrazas ceterajn esprimojn; estas malpermesate derivi vortojn „neregule”.

Latino sine flexione kaj Basic English aplikis principon de selekta fideleco ĝis ekstrema limo. Unu pri lingvo morta, la dua pri lingvo viva. Ili faris siajn sistemojn tuj kompreneblaj por sciantoj de la origina lingvo, sed uzi ilin aktive por verkado kaj parolado estas ne tro facile, ĉar manko de fiksjaj gramatikaj reguloj naskas preskaŭ ĉiam dubon pri taŭgeco de vort- kaj frazkonstruo.

Esperanto apartenas en kategorion de aposterioraj lingvoj kaj estas la plej bona el ĉiuj tiaj sistemoj. Estas mirinde, kiel sukcesis intuciĝo de Zamenhof solvi la multajn problemojn. Li elserĉis radikojn el la lingvoj franca, angla, germana kaj rusa laŭ pritakso de ilia internacieco, facileco memori, facileco elparoli, taŭgeco por fonetika ortografio. Pri internacieco de vortradikoj estas eblaj du vidmanieroj. La radiko estas en la plej disvastigita lingvo ekz. en la angla aŭ en la rusa, aŭ la radiko estas la sama en respektinda nombro de lingvoj ne tiom disvastigitaj sed en la sama aŭ simila signifo. Temis do dum tia elserĉado pri efektiva selekto. Zamenhof selektadis laŭ tiuj vidmanieroj, sed sole taksante ne mezurante la valoron de la radikoj. Tamen li sukcesis tiom mirinde, ke en jaroj ĉ. 1910, kiam estis farita dum la ido-krizo kritiko de tiu ĉi selekto, estis trovitaj el 1800 radikoj de la Universala Vortaro sole 50 kiel netaŭgaj. Inter ili estas ekz. „gurd”.<sup>3</sup> La plej kritikataj inter la oftaj radikoj estis ĉeval-o (kial ne kaval, kiam ekzistas Cavalerie kaj Cavalier francaj?) kaj bird-o (kial laŭ la angla bird dum latine estas avis, france oiseau, germane Vogel?) kaj bulk-o kreita laŭ la rusa nomo. Sed eĉ multajn el kritikataj tiuj radikoj oni povas defendi. Zamenhof ĉivitis tre zorge sinonimojn kaj atentis, ke eĉ vortokreaj afiksoj ne estu sino-

nimaj kun iuj vortoj. Ankaŭ afiksojn Zamenhof elektis el la vivaj lingvoj, ankaŭ inter ili ne estas multaj aprioraj, arbitraj, elementoj. Sed la karaktero de la vortkunmeto en Esperanto ne estas fleksia aŭ deriva sed aglutina. Tio signifas, ke la vortoj estas formataj per kunmeto de memstaraj vortoj,<sup>5</sup> kiuj konservas ĉie sian propran signifon. Tiaj memstaraj kaj memsignifaj eroj de la lingvo estas ankaŭ la finaĵoj vortokreaĵ -o, -a, -e, -i, -as, -is, -os, -us, -u.

Laŭ tiu vidmaniero Esperanto similas al lingvogrupo uralo-altaja kaj al unusilabaj lingvoj aziaj precipe al la ĉina kaj oni povas paroli pri ekstereŭropa karaktero de E-a morfologio. Ĉiu E-lingvo-elemento troviĝas en la vortaro kaj oni povas uzante la vortaron deĉifri ĉiun tekston en la lingvo, precipe se oni dividis tiujn elementojn per streketoj, kiel estis kutimo en la unuaj jaroj. Tio faras Esperanton akceptebla al Azianoj, kiuj ekzemple preferas la vorton kiel „vagonarhaltigilo“ al „bremso“. Pro tiu principo de agluado de vortoj E, fariĝis ne nur simpla kaj facila por lerni, sed ankaŭ tre riĉa en esprimeblecoj.

Sed krom aposterioraj elementoj enestas en E. ankaŭ kelkaj elementoj aprioraj, kiujn Zamenhof elektis, kiam ŝajnis al li, ke materialo interlingva ne estas taŭga ĉu pro granda nereguleco, ĉu pro malfacila fonetiko. Apriora estas precipe la tabelo de korelativoj, kiu solvis la problemon tre malfacilan, kiel esprimi korelativajn ideojn kaj rilatojn esprimatajn en ĉiuj lingvoj per ĥaosaj vortetoj kaj parolturnoj, kaŭzantaj erarojn eĉ al nacilingvanoj.

Kaj la vortoj aglutine formitaj estas kunigitaj en tuton per gramatiko, kiu estis derivita el lingvoj slavaj, kun akuzativo, akordiĝo de adjektivo kun substantivo<sup>6</sup> kaj libera vortordo, kio kune kondiĉas slavsimilan sintakson.

Estis kritikataj en E. precipe supersignitaj literoj, aglutina karaktero, aprioraj elementoj, akuzativo, akordiĝo de adjektivo kun substantivo. Oni proponadis reformojn, sed la plej multaj esperantistoj depost komenco sentis sin respondecaj pri evoluo de la lingvo kaj konsentis nur pri riĉigado de la vortrezoro kaj pri polurado de la lingvo-uzo per natura evoluo.

Tiuj esperantistoj, al kiuj ŝajnis progresado de la lingvo tro malrapida, proponadis ŝanĝojn tujajn; rezultis el tio pluraj lingvoprojektoj same aposterioraj kiel Esperanto, sed neniu el ili ricevis ĝis nun pli vastan resonon ĉe la publiko. La plej ĉefaj inter ili estas:

Ido, E. modifita de Louis Couturat, franca filozofo, helpata de Beaufort en 1907. Ĝi forigas la supersignitajn literojn, ĉe selekto de la vortradikoj ĝi pli akcentas internaciecon, indikante sian internaciecon „absoluta“, tiun de E. „proporcia“, sed laŭ statistikoj ne tute fidindaj. La aŭtoroj de ido ne sufiĉe respektis internaciecon de radikoj el la germana kaj el la rusa. Tiam ankoraŭ ne estis sufiĉe klara la aglutina karaktero de E. kaj Ido mallaŭdis la vortkreadon en E. kiel derivadon nesciencan kaj proponis derivadon multe pli komplikan kun pluraj novaj afiksoj. Ĝi volis ekz. distingigi inter pluva tago kaj pluva akvo kaj krom novaj sufiksoj ĝi starigis devigon al ili. Ekz. oni ne rajtas derivi de martel-o martel-ar (-ar estas finaĵo por infinitivo) kiel en E. marteli sed oni devas enmeti -ag-, do martelagar. Per tio la lingvo fariĝis tro monotona kaj la vortoj malpli oportunaj sed ne pli unusencaj. Ido estis komence laŭdata de kelkaj profesiaj lingvistoj, sed ne lernata de ili. La ido-adeptoj dum tempo perdis intereson aŭ transiris al Occidental aŭ al Novial.

Occidental de E. von Wahl el 1922 volas, ke la derivitaj vortoj ĉiam aspektu tre similaj al la origina formo de la vorto. Kiel kampon por sia selekto li elektis sole la lingvojn latina, franca, angla, la radikojn en E. selektitajn el la germana kaj el la rusa li nomas barbarismoj. Occidental akcentas, ke ĝi estas derivita el la kulturaj lingvoj de Okcidento; en 1949 ĝi akceptis novan nomon „Interlingue“ verŝajne pro propagandaj celoj. La selekta fideleco estas kondiĉita per granda nombro de sufiksoj (ĉ. 100); sed ili ne havas fiksan signifon kaj pluraj estas por la sama ideo. Komparu:

Occidental:	Naciaj formoj:
malad/ie	F. maladie
qual/i/tá	F. Qualité, L. Qualitas, G. Qualität
long/ore	F. longueur (sed L. longitudo, I. lunghezza)
alt/ess	F. hauteesse

Sed la surpriza koincido ĉesas efiki, se ni komprenas, ke tiuj kvar diversaj afiksoj havas la saman signifon: „kvalito“. Certe occidental estas pli tuj komprenebla por tiuj, kiuj scias latinidajn lingvojn, ol estas E., sed por aktiva uzo — kaj tio estas la plej ĉefa aplikebleco de helpa lingvo — ĝi estas multe pli malfacila.

Novial de glora lingvisto O. Jespersen el 1928 volas forigi la diverssencecon de la occidentalaj deriviloj kaj tamen ĝiaj derivaĵoj montras mirinde grandan selektan fidelecon. Sed pli detala esploro vidigis, ke dum pli vasta aplikado aperas diversaj neregulaĵoj kaj konsekvencoj malfacile defendeblaj. Kaj praktika apliko de novial restis ĝis nun preskaŭ nula.

El lingvaj studoj, el kiuj rezultis Ido, occidental kaj novial, Esp-o tre profitis. Ĝiaj verkistoj, vortaristoj, poetoj, versistoj, oratoroj uzis multon el teorioj kaj spertoj de la reformuloj. La efiko estis puriga kaj netiga, verkantoj klopodis al pli granda precizeco en vortuzado, al klareco de la stilo, al apliko de reguloj pri libera sed ne arbitra vortordo. Rezultis el tiu strebado kaj provado lingvaĵoj relative tre bona en niaj gazetoj kaj libroj jam en la jaroj antaŭ la eksplodo de la dua mondmilito kaj nune.

Estas komprenebla fakto, ke krom sistemoj aprioraj kaj aposterioraj ekzistas ankaŭ sistemoj miksitaj, lingvoj, kiuj havas la naturajn lingvojn kiel modelon nur parte. Ankaŭ inter ili aperas multaj projektoj. La plej fama estas Volapük de J. M. Schleyer el 1880. Por sia selekto li uzis kiel fonton nur la anglan lingvon sed kun aprioraj starigitaj principoj. La bazaj radikoj devis esti laŭ ebleco unusilabaj kaj nepre komenciĝas kaj finiĝas per konsonanto; la vortoj neniam finiĝas per sibilantaj s, ŝ, z, ĉ por eviti intermikson kun plurala finaĵo „s“. La litero „r“ estas tute forĵetita pro ĝia malfacila elparoleblo fare de ĉinoj, maljunuloj kaj infanoj. Tial okazis, ke la radikoj estas preskaŭ ne koneblaj. Pük estas lingvo el la angla speak, nol estas scio el la angla knowledge kaj plim el compliment. La selekta fideleco de volapük estis tre malgranda. La gramatiko estas relative simpla, sed tamen multe pli komplika ol ĉe Esperanto. Personaj pronomoj estas ob, ol, om, of por singularo kaj obs, ols ktp. por pluralo kaj oni konjugacias Iō f-ō n — ami: löfob, löfol, löfom, löfof, löfobs, löfols, löfoms, löfofs.

Tiu ĉi divido de la artefaritaj lingvoj en tri kategoriojn kaj enlistigo de la projektoj estis unuan fojon farita en libro Couturat et Leau: Histoire de la langue universelle, 1903, dua eldono 1907, kaj Couturat et Leau: Les nouvelles langues internationales 1907.

Esperantlingve pritraktas tiun temon „E. Drezen: Historio de la mondlingvo. Tri jarcentoj de serĉado. La unuan Esperanto-eldonon de la verko tradukis, prilaboris kaj redaktis H. Hohlov kaj N. Nekrasov. Ekrelo. Leipzig 1931.“ Ĝi estas traduko kompletigita de la origine rusingva verko aperinta en 1928 kun speciala antaŭparolo de N. I. Marr, aŭtoro de la jafetida lingvoteorio.

Nuna interlingvistiko preferas diri anstataŭ aposteriora naturalisma kaj anstataŭ apriora skema. Al ni ne ŝajnas la novaj terminoj pli taŭgaj.

Poznámky: <sup>1</sup> pojem, <sup>2</sup> vedle cíle dorozumívacího též cíl pořadací, <sup>3</sup> výběrový, <sup>4</sup> kolovrátek, <sup>5</sup> slovní součást, <sup>6</sup> shoda přídavného jména s podstatným.

\*

Ĉiu teruragado senmoraligas (Roza Luksemburg).

\*

Nacio povas ekperei unusole etike, sed tion ne povas kaŭzi iu ekstera altrudado aŭ suferado. (Zdeněk Nejedlý).